

# STARTO

**N-ro 3/2010 (236)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



La pentrado de infanoj kun Pavel Rak dum la muzea nokto en Svitavy  
la 12-an de julio 2010 en Esperanto-muzeo  
Ottendorfer-domo Svitavy

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-  
Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici  
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615  
651, cea@esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu  
linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč  
por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo.  
Duobla reklamo 15% rabato, trifoja  
reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj  
duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200  
Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola,  
enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč ko-  
mencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj:  
Jana Melichárková, Polní 938, 696 02  
Ratiškovice, melicharkova8@seznam.  
cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří  
Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42  
Vracov, tel. 518 628 155,  
anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana,  
blindula, medicina, fervojista, pri  
informadiko

**Komisiono de ĈEA:** pedagogia

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:**  
Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538,  
738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova  
@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

**Poštovní spořitelna Poděbrady**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidantino:** Jana Melichárková, Polní  
938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@  
seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kun-  
ordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201,  
chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj,  
fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-  
retkomunikoj, eldona agado)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše  
3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611  
584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo,  
konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Na Vinici  
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615  
651, cea.polnický@quick.cz (protokolado,  
korespondado, rilatoj kun la banko)

**Kasistino (komitatano A de UEA):** Libuše  
Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany,  
libusehyblova@seznam.cz, 774 928 974  
(membrobazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Grego-  
rova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424,  
pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projek-  
toj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:**  
Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625  
00 Brno, tel. 547 240 690, malovec  
@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-  
perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo  
nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828,  
Lucie.Karesova@seznam.cz

## Kontrolgrupo de ĈEA:

**Prezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní  
2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257,  
dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04  
Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00  
Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer  
domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy,  
direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532  
704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, Pavel Polnic-  
ký, Vratislav Hirš.

## Interproksimigo de kulturoj

Tio estis la kongresa temo de la 95-a UK en la kuba ĉefurbo Havano inter la 17-a kaj 24-a de julio 2010, ĉar tiun temon proklamis Unesko por ĉi tiu jaro.

Venis nur ĉirkaŭ mil esperantistoj, ne sole pro distancaj motivoj, sed ankaŭ pro la kuba politika reĝimo, kiu havas problemojn kun respektado de homaj rajtoj. Ekestis eĉ granda diskuto pri tiu temo, sed plej multaj opiniis, ke ili volis subteni la kubajn esperantistojn, ne la kuban reĝimon, same kiel en 1987 UEA subtenis en Varsovio la polan esperantistaron, ne la polan reĝimon sub Jaruzelski.

Okazis multaj kutimaj programoj, el kiuj vekis grandan intereson kverelo pri tio, ĉu Stano Marček (kiu antaŭ nelonge fariĝis akademiano) daŭrigu la redaktadon de la asocia revuo *Esperanto*. Multaj opinias, ke la revuo ne plu estas interesa kaj ke Marček kulpas, ke li perdis pli ol 800 abonantojn. La estraro ne longigis kontrakton kun li, preparas novan redaktan politikon, laŭ kiu oni efektivigos konkurson pri nova redaktoro, kiun la malnova povas ankaŭ partopreni. Nu, nova redaktoro havos malfacilan taskon, se li volos superi Stanon.

La kongresan kurieron Havana Karavano (6 numeroj) vi povas elŝuti en PDF ĉi tie:

[www.uea.org/kongresoj/uk\\_2010.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html)

La inaŭguran festparoladon prezentis Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, la kongresan temon enkondukis Geoffrey Greatrex. La kongreso fondis novan organizon Esperanto por labori ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj promesis baldaŭ anonci kondiĉojn por membriĝo.

## REZOLUCIO DE LA 95-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Havano (Kubo) kun 1002 partoprenantoj el 59 landoj,

Konsiderante, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 Internacia Jaro de Interproksimigo de Kulturoj, konstatas - ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro;

- ke jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj

- ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn,

Deklaras la deziron de la Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj, kaj invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon plene eluzi siajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio por efike realigi siajn celojn.

*Havano, 24 julio 2010*

### PREMIO DEGUĈI AL PHILIPPE CHAVIGNON

Philippe Chavignon naskiĝis en 1958 kaj esperantistiĝis en 1984. Li ricevis la premion pro sia agado en multaj landoj de Afriko kaj Latina Ameriko, kie li plenumis diversajn informajn, instruajn kaj organizajn misiojn por UEA. En la 1990-aj jaroj li ekaktivis en indiĝenaj medioj, kunlaborante por la projekto Indiĝenaj Dialogoj kaj poste por la UEA-projekto Indiĝenaj Popoloj.

## ELSTARAJ ESPERANTO-AGANTOJ DIPLOMITAJ EN HAVANO

Sep elstaraj Esperanto-agantoj estis diplomitaj en la ferma ceremonio de la 95-a Universala Kongreso en Havano. Unuafoje la Estraro de UEA aljuĝis la novan Diplomon pri Elstara Arta Agado, kiun la Komitato starigis kiel samrangan ekvivalenton de la Diplomo pri Elstara Agado, asignatan ekde 2007 por rekoni eksterordinare meritplenan agadon por Esperanto. Kiel la nomo diras, la nova diplomo premias eminentan kontribuon al la Esperantaj kulturo kaj arto.

Diplomon pri Elstara Arta Agado ricevis **d-ro Rüdiger Sachs** el Germanio, kiu ekde 1997 gvidas Internacian Sciencan Asocion Esperantistan, redaktante ankaŭ ĝian gazeton "Scienca Revuo".

Diplomon pri Elstara Arta Agado ricevis aktorino **Georgina Almanza** (Kubo), aktorino **Vida Jerman** (Kroatio), ĥor-estrino **Franjo Lévêque** (Francio), aktoro **Saša Pilipović** (Serbio), verkisto **Trevor Steele** (Aŭstralio) kaj verkistino **Spomenka Štimec** (Kroatio).

S-ro **Ulrich Brandenburg**, la germana ambasadoro en Moskvo, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La unuaniman decidon faris la Komitato de UEA en sia kunsido en Havano la 17-an de julio.

### LA 95-A UK OMAĜIS AL NELSON MANDELA

La inaŭguro de la 95-a UK en Havano koincidis kun la 92-a naskiĝtago de Nelson Mandela. Kun forta aplaŭdo la kongresanaro omaĝis al la Nobel-premiito.

## BELARTAJ KONKURSOJ

**POEZIO:** 1. ne aljuĝita; 2. Josip Pleadin (Kroatio) pro *Antaŭ via foriro*; 3. Josip Pleadin pro *Ekzistas ie kaŝita loko*.

Partoprenis 29 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

**PROZO:** 1. Edmund Grimley Evans (Britio) pro *En katedralo*; 2. Sten Johanson (Svedio) pro *Verda ondado*; 3. Luiza Carol (Israelo) pro *La deturniĝo*; Honora mencio: Paulo Sergio Viana (Brazilo) pro *Rulseĝo*.

Partoprenis 50 verkoj de 30 aŭtoroj el 14 landoj.

**ESEO:** 1. Christian Rivière (Francio) pro *Vortfarado kaj radikfarado*; 2. Doron Modan (Israelo) pro *L'espero, l'obstino kaj la pacienco*; 3. Paulo Sergio Viana (Brazilo) pro *La literatura vivigo de Esperanto*.

Partoprenis 9 verkoj de 8 aŭtoroj el 6 landoj.

**TEATRAĴO:** 1.-2.: ne aljuĝitaj; 3. Lena Karpunina (Rusio) pro *Kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas*; Honora mencio: Stefan MacGill (Hungario) pro *Kroka paradizo*; Honora mencio: Adrienne Pásztor (Hungario) pro *Princino Seka Diazbeti*.

Partoprenis 5 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj.

**KANTO:** 1. Duoble Unu (Francio) pro *Sen lim' ĝis...*; 2. Kaj Tiel Plu (Katalunio) pro *Surplacem venu vi*.

Partoprenis 9 verkoj de 5 grupoj aŭ unuopuloj.

**INFANLIBRO DE LA JARO:** *Reĝo Maĉjo la Unua* de Janusz Korczak, eldonita de Swidnik (Pollando).

Partoprenis 9 libroj de 7 eldonejoj el 6 landoj.

**FILMO:** 1. ne aljuĝita; 2. Edukado@ Interreto pro *Esperanto estas...*; Honora mencio: Gian Piero Savio (Israelo) pro *Ne simple poeto; intervjuo kun Mikaelo Giŝpling*.

Partoprenis 2 filmoj el 2 landoj.

## TRI PREMIOJ DE FONDAĴO GRABOWSKI EN 2010

La ĵurianoj de la Fondaĵo (Ulrich Lins, István Ertl kaj Mine Yositaka) aljuĝis ĉiujare tri monpremiojn.

Premion de 900 USD ricevis Klivo Lendon, kanadano vivanta en Tokio, kiu esperantigis la epokfaran verkon *La origino de specioj* de Charles Darwin.

Alia premio, ankaŭ 900 USD, estis donita al Geoffrey Sutton, angla filologo kaj iama redaktoro de la revuo *Esperanto*, kiu kompilis anglalingvan enciklopedion pri la originala literaturo en Esperanto, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. La 740-paĝa volumo aperis en 2008 ĉe la eldonejo Mondial en Novjorko.

Speciala premio de 500 USD estas dediĉita al la memoro de Madeleine de Zilah, kiu kunfondis la revuon *La Gazeto* en 1985 kaj kunredaktis ĝin ĝis sia subita forpaso en 2009.

## SUBVENCIO CIGNO POR DU PROJEKTOJ

Subvencio Cigno de UEA, financata de la japana industriisto Miyoshi Etsuo, donata ĉiujare por subteni seriozan Esperanto-agadon en la Tria Mondo aŭ la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo, estis egale dividita inter du ricevantoj.

Esperanto-Asocio de Bosnio kaj Hercegovino ricevas subvencion por la renovigo de sia sidejo-kunvenejo.

Komisiono por Meza Oriento kaj Norda Afriko por informado pri Esperanto en arablingvaj landoj, unuavice en Libano kaj Egiptio.

## Kongresaj impresoj

Marek Blahuš

Ĉi-somere mi havis unikan ŝancon vojaĝi al la mezamerika lando Kubo kaj partopreni tie unue turisman semajnon, sekve la 95-an Universalan Kongreson de Esperanto en Havano kaj fine ankaŭ la 66-an Internacian Junularan Kongreson de TEJO okazintan en nefora ĉemara ripozejo Villa Trópico. Tion grandparte ebligis al mi la agentejo KAVA-PECH, en kies nomo mi al Kubo gvidis flugkaravanon de 18 esperantistoj el 4 landoj (Ĉeĥio, Germanio, Slovakio, Britio), anstataŭante Petron Chrdle, kiu persone partopreni ne povis. Ĉi-sube mi por la legantoj de Starto priskribas kelkajn programerojn de la 95-a UK, en kiuj mi mem aktive partoprenis.

**Movada Foiro:** Tiu programero, okazanta jam la vesperon antaŭ la kongresa inaŭguro, dume fariĝis tradicia kaj denove allogis kelkdekon da prezentiĝemaj organizoj. La tablojn de KAVA-PECH kaj ĈEA oni starigis apude, tiel ke ĉe la unua deĵoris mi, dum ĉe la alia Miloš Bloudek kun sia edzino – escepte de momentoj kiam iu foriris mem iom ĉirkaŭrigardi kaj tiam la du ceteraj anstataŭis. Aldone mi liveris kelkajn varojn de E@I, en kiu mi aktivas, al la tablo de TEJO, kie tutan tempon deĵoris aliuloj. Al la tablo de KAVA-PECH alvenadis multaj homoj, tial la kutiman rakonton pri la Esperanto-eldonejo kaj agentejo el Ĉeĥio en Eŭropo, sekvatan de mallongaj prezentoj de la demonstrataj eldonaĵoj, ĉiam iomete adaptitan laŭ la divenita aŭ eksciita intereso de la vizitanto, mi ripetis certe plurdekfoje.

Krom la ses libroj eldonitaj dum la lasta jaro, mi havis surtable ankaŭ kelkajn pli malnovajn eldonaĵojn, el kiuj aparte la esperantigita versio de la rakontoj pri soldato Ŝvejk vekis apartan intereson. Aldone disponeblis ekzempleroj de du flugfolioj – katalogo de eldonaĵoj kaj propono de eldonaj servoj – dum la tablo de ĈEA sammaniere varbis por la konferenco en Poděbrady kaj la muzeo en Svitavy. Pluraj homoj demandis pri prezoj kaj disponeblo de la ekspoziciataj libroj, al tiuj mi do donis proksimuman indikon kaj sendis ilin al la kongresa libroservo.

Inter la vizitantoj de la tabloj estis surprize multaj kubanoj (eble eĉ triono de ĉiuj interesiĝantoj!), kaj je mia surprizo pluraj el ili anstataŭ demandi pri la libroj ekscitite al mi rakontis pri siaj iamaj esperantistaj korespondantoj el Ĉeĥoslovakio, ofte jam de antaŭ kelkaj jardekoj.

**Libroj de la jaro:** Kompare kun la antaŭaj jaroj, tiu ĉiujara UK-programero estis ĉi-foje multe pli modesta ol kutime – prezentiĝis nur proksimume kvin da eldonistoj. Mia prezento pri KAVA-PECH okazis komence, tuj post la inaŭgura prezento de la eldona agado de UEA. La programero okazis ĉi-foje rekte en la kongresa libroservo, sed ankaŭ tio ne sukcesis allogi al ĝi signifan nombron da spektantoj (ĉeestis nur iom pli ol deko) – verŝajne ankaŭ pro tio ke el la kongresanoj en Kubo pluraj ankoraŭ ne bone konis la tradiciojn de la UK-oj. Dum mia elpaŝo mi prezentis jenajn librojn: Bonvenon en nia mondo, Desegnita humuro, Esperanto přímou metodou, Ilustrita frazeologio, Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj, Rimenigmoj.

**Landa salutanto kaj akcepto ĉe la ambasadoro:** Rerenkontiĝinte kun la sinjoro-kolego el la (alfabete) najbara Bulgario jam konata el la pasinta UK, mi ankaŭ en Havano havis la honoron saluti de sur la podio „nome de la Esperanto-asocio kaj la Esperanto-junularo de Ĉeĥio“ (kies nominativan substantivan formon, evidente ne tiom bone konatan en Ameriko kiel en Eŭropo, mi tiel celis akcenti) kaj aldonis, laŭ eksplicita peto de José Vergara al ĉiuj salutantoj, ĉeĥan tradukon de la frazo "Patrujo estas homaro" (citaĵo de kuba verkisto José Martí). La inaŭguron de la kongreso partatempe ĉeestis la ĉeĥa ambasadoro en Havano, sinjoro Milan Jakobec, kiu akceptis la inviton de UEA kaj kiun dum lia ĉeesto akompanis sinjorino Eliška Mikušová. La ambasadoro decidis forlasi la salonon pli frue, ĉar kunĉeestis lia kelketjaraĝa filo, sed li invitis la ĉeĥajn kongresanojn al la ambasadejo, kun kiu ni pertelefone sukcesis post iom da komplikaĵoj aranĝi por vendredo tempon de vizito.

En la ambasadejo, kiu situas tre proksime de la kongresejo (tamen ni estis veturigitaj per aŭto), akceptis nin la ambasadoro kun sia edzino (kaj la filo, krom kiu ankoraŭ eĉ pli juna filino dormis sub gardo de vartistino unuaetaĝe), regalis nin interalie per ĉeĥa biero, kubaj rumoj kaj hejmbakita ĉeĥa kuko ("bábovka") kaj dum pli ol du horoj babilis kun nia sepkapa grupo (Marek Blahuš, Lenka Bloudková, Miloš Bloudek, Libuše Gabalda, Marie Lidická, Eliška Mikušová, Josef Trojan). Ni lernis multon de lia sperto (kaj li parolis al ni tute sincere pri siaj kubaj impresoj). Fine li dankeme transprenis de ni kelkajn materialojn pri Esperanto.

**Urbeŝtra akcepto:** Kiel landa salutinto mi ricevis ankaŭ inviton al la "urbeŝtra akcepto", kiu esence estis malgranda bufedo akompanata de kelkaj kantoj fare de kuba kantistino kaj parolaj elpaŝoj de Probal Dasgupta kaj la honora LKK-ano, vicministro pri kulturo de Kubo. La vespero okazis en salono de luksa hotelo ĉe la marbordo en la urbocentro de Havano, kun transporto per aŭtobusoj. Tamen nenion apartan mi spertis dum tiu programero, eble krom la agrabla persona konatiĝo kun Geoffrey Greatrex, kunreĝisoro de la kongresa temo, dum unu el la babilaj paŭzoj.



*Partoprenantoj de la flugkaravano de KAVA-PECH al Kubo kun ĉiĉeronino kaj ŝoforo*

**Komitatkunsido:** Pro invito anstataŭi la nove nomumitan, sed ĉi-jare neĉe-estantan komitataninon A por Ĉeĥio, sinjorinon Libuše Hýblová, mi dum la 95-a UK plene ĉeestis ĉiujn tri sesiojn de la komitatkunsido de UEA. Ili efektive estis sufiĉe interesaj por mi, tiel ke mi en la fino eĉ preskaŭ bedaŭris ke mi estas nur unufoja anstataŭanto. Saman rimarkon cetere havis pluraj aliaj komitatanoj, inkluzive de tiuj pli spertaj en la posteno, ĉar evidente la komitatkunsidoj ĉi-jare

estis pli vivaj ol kutime. Interalie oni arde diskutis pri la redakta politiko de revuo Esperanto kaj la anoncita ŝanĝo de redaktoro, sed klare observeblis ankaŭ la daŭre pli konkretaj kaj plimultiĝantaj alvokoj al UEA pli okupiĝi pri konkreta movada agado sur la kampoj de informado, edukado, junularo kaj regiona agado. Same aperis voĉoj postulantaj ŝanĝon en la regularo kiu nun direktas ĉiun monon de ricevitaj heredaĵoj al la ĝenerala kapitalo de la organizo, kaj ne al konkreta movada agado. Mi aktive sekvis la evoluon de la kunsidoj, ankaŭ eksterkunside pludiskutis la temojn kun la aktivuloj, kaj cetere ankaŭ volontulis helpi kiel kunprotokolanto. Krome mi ĉeestis ankaŭ dumsemajnajn kunvenojn de kelkaj subkomitatoj (laborgrupoj): pri Financoj, pri Faka agado kaj pri Junularo (tiun lastan mi mem gvidis). Mi esperas, ke ankaŭ la venonta agado de la komitato plu estos almenaŭ tiom viva kaj alportos almenaŭ tiom da fruktoj, kiom tiu ĉi ĵus okazinta kunsido. Sed por tio oni jam devos atendi ĝis la sekva jaro, ĝis la 96-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Kopenhago, Danio.




*S-ro Sveda (Ĉeĥio/Kanado) ĉe la tablo de ĈEA*

*Vidu ankaŭ la paĝon 76*

## OSIEK kaj Internaciaj Esperanto-Konferencoj

OSIEK estas mallongigo por Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj, jure registrita en Aŭstrio. Temas pri Societo kun ne multnombra membraro, nur iom pli ol 70, el tio 13 dumvivaj, tamen kun tre riĉa kaj alloga agado, kiun mi volas nun iom alproksimigi al la legantoj de Starto.



Ĉiujare ĝi organizas Internacian Esperanto-Konferencon (IEK). Kaj mi volas emfazi, kial IEK estas laŭ mi pli fidela al sia titolo „konferenco“ ol la ceteraj similspecaj aranĝoj. Tiuj, inkluzive de la plej gravaj kongresoj, UK kaj IJK, estas pli festivaloj de Esperanto, ĉar tie pli ol la pritrakto de la difinita temo gravas nur, ke la traktado okazu en Esperanto. Male, dum la tuta semajno de IEK oni ĉiam pritraktas unu temon, memkomprene el diversaj vidpunktoj kaj kun nur

kelkaj ekstertemaj prelegoj (kutime nur komence pri la loko kaj historio de la konferenc-urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo). Tamen, la prelegoj okazadas ĉiam antaŭtagmeze kaj nur malofte ankaŭ posttagmeze aŭ vespere, tial restas ankaŭ tempo ĝui turisman kaj kulturalan programojn dum posttagmezoj kaj vesperoj.

En Ĉeĥio okazis IEK jam dufoje, en la jaro 2001 en Strážnice kun la temo „Karolo Píĉ kaj lia mondo“ (ĝin organizis Vlád'a Hasala per sia agentejo Espero) kaj en 2003 en Prago kun la temo „Intimaj temoj en Esperanto-beletro“ organizita de KAVA-PECH. Kaj trian fojon ĝi okazos en Ĉeĥio, nome en Svitavy, en la jaro 2012 kun la temo „Sciencfikcio kaj Robotoj“. Ĝin organizos denove KAVA-PECH, kiu por tiu okazo preparas ilustritan eldonon de Esperanto-versio de la dramo R.U.R. fare de Karel Čapek, en kiu unuan fojon la termino „robot“ estis uzita por inteligenta artefarita estaĵo simila al homo. Kiel konate, la termino sekve estis transprenita al preskaŭ ĉiuj lingvoj en la mondo.

Sed la organizado de IEKoj ne estas ununura aktiveco de OSIEK: Ĝi tre proksime kunlaboras kun altnivela (kaj enhave, kaj aspekte) kultura periodaĵo La Gazeto, certe unu el la plej valoraj periodaĵoj el ĉiuj aperantaj en Esperantujo. Ĝi estas preskaŭ neoficiala organo de OSIEK, ĉar la societo informadas sian membraron kaj publikon precipe pere de ĝi.

Ĝia plua tre laŭdinda agado estas la ĉiujara aljuĝado de premio OSIEK al vivanta esperantisto pro kultura nefikcia kreaĵo en Esperanto (libro, kasedo, kompaktdisko, ...), kies amplekso egal-



valoras almenaŭ al 100-paĝa libro. Ĝi estas aljuĝata ekde la jaro 1990 kaj ĝia momenta alteco estas 700 EUR (ekde 2009). La proceduro de la aljuĝo estas centprocente demokrata: La verkon por ĝi rajtas proponi ajna OSIEK-membro, sekve ĉiuj proponoj estas prezentitaj en La Gazeto kaj la legantoj voĉdonas, kiun el la proponitaĵoj ili konsideras la plej meritplena por ricevi la premion. Kaj kvin el ili, tiuj kun la plej multaj voĉoj, estas sekve prezentitaj dum la konferenco, en kiu ene de la ĝenerala asembleo de OSIEK (ĉiam la lastan antaŭtagmezon de la konferenco) estas per sekreta voĉdonado (kiun rajtas partopreni nur ĉeestantaj membroj de OSIEK) elektita la gajninto.

Inter laŭreatoj de la premio OSIEK estas ankaŭ Eli Urbanová, al kies verko „Hetajro dancas“ la premio estis aljuĝita en la jaro 2001. Inter la aŭtoroj ripete proponitaj por la premio estas ankaŭ Miroslav Malovec kun la verko „Gramatiko de Esperanto“.

OSIEK ankaŭ apogas la projekton de Nova Universala Vortaro, simila al tiu de Zamenhof, sed kompreneble pli ampleksa kaj moderna.

En la jaro 2011 IEK okazos en la urbo Wuhan (Ĉinio) ekde la 18-a ĝis la 23-a de aprilo kaj oni pritraktos la temon „La ĉina saĝo“. Krom prelegoj la organizanto promesas interesajn urbovizitojn (muzeoj, La Orienta Lago, Jang Zi rivero) kaj por vesperoj konigojn de ĉinaj tradiciaj kulturoj (kaligrafio, te-ceremonio, dancoj) kaj „multajn aliajn surprizojn“.

La lokaj organizantoj proponas antaŭ IEK tritagan programon (Pekino, Ĉina Murego, An Yang) kaj post interkonsento kun la ĉeforganizanto por tiuj, kiuj Pekinon kaj Grandan Muron jam

vizitis dum UK, la kongresa agentejo KAVA-PECH proponas alternativan turisman programon lige al IEK, nome ekkonon de ambaŭ „urboj de la 3-a jar-milo“ Ŝanhajo kaj Honkongo, restadon en belega regiono de konusformaj montetoj Yangshuo, ŝipveturadon laŭ la rivero Li kun rigardo al la fiŝkaptado helpe de kormoranoj, ktp. La vojaĝo (inkluzive de la konferenco) estos 15-taga, ekde la 15-a ĝis la 29-a de aprilo.



Pli da informoj pri OSIEK oni povas trovi ĉe [www.osiek.org](http://www.osiek.org), pri la menciita flugkaravano lige al IEK 2011 ĉe [www.kava-pech.cz/wuhan](http://www.kava-pech.cz/wuhan)

Petro  
Chrdle, dumviva membro de OSIEK

**Sekcio de kristanaj  
esperantistoj de ĈEA  
invitas vin al la  
KONGRESO de KELI  
2 - 9. 8. 2011  
en Poděbrady**

# Honoraj membroj de ĈEA

## Zdenka Novotná (1933)

*S-ino Zdenka Novotná estas instruistino-pensiulino. Ŝi komencis sian aktivan laboron en la jaro 1951. Dum komunisma tempo ŝi estis ofte persekutita precipe pro sia kristana kredo. Ŝi povis instrui nur en malgrandaj vilaĝaj lernejoj, ofte fore de sia hejmo. Post pensiuliĝo, ŝi ofte laboras kiel helpinstruistino. En la Esperanta movado ŝi aktivas en loka rondeto kiel prezidantino, ŝi estas membro de ĈEA, IKUE kaj AEH.*



### 1. Kiel vi konatiĝis kun Esperanto?

Mia vojo al Esperanto estis iomete komplika. Antaŭ 39 jaroj, en la jaro 1971, mia patrino estis grave malsana. Mi prizorgis ŝin kaj klopodis helpi al ŝi en ŝia malbona situacio. Gravan signifon havis por ŝi ankaŭ morala helpo de unu handikapulo, kun kiu ŝi konatiĝis pere de

gazeto „Katolický týdeník“. Post morto de mia patrino li montris al mi, ke ankaŭ aliaj handikapitaj homoj bezonas helpon kaj kontaktigis min kun Cilka Kotyzová, kiu tiam estis lerta esperantistino. Ŝi tuj post nia interkonatiĝo aligis min en Esperanta tendaro en Herbortice kaj tie mi unuan fojon konatiĝis kun Esperanto.

### 2. Kion donis al vi Esperanto?

Mi respondos tute koncize – multege. Se mi pripensas detale tiun ĉi demandon, mi volus ĉefe substreki, ke mi pere de Esperanto trovis grandegan nombron da amikoj vaste en la mondo. Sed mi devas konfesi, ke Esperanto ŝanĝis ankaŭ mian karakteron – mi atingis kuraĝon dum komunikado kun por mi nekonataj homoj, mi perdis embarason, kiam mi povis paroli kun aliaj esperantistoj. Mian vivon pliriĉigis multaj kontaktoj kun interesaj homoj kaj precipe tiuj kontaktoj anime proksimigis min kun ili. Mi eĉ ricevis, dank’ al Esperanto, praktikan econ – nome certecon dum veturado al fremdaj landoj, ĉar ĉie kien mi vojaĝas (ĉefe kun infanoj el nia Esperanta kurso) mi havas amikojn, kiuj pretas helpi al mi, se necesas.

### 3. Kiel vi vidas estontecon de Esperanto?

Tio estas tre malfacila demando. Mi estas dekomence instruistino kaj el tiu motivo, mi klopodis instrui Esperanton al infanoj. Sed estas fakto, ke nun ili ĝenerale havas aliajn interesojn kaj mi konstatas malintereson pri lernado de fremdaj lingvoj, precipe Esperanton. Tamen mi esperas, ke post iu tempo situacio ŝanĝiĝos kaj junaj homoj konscios la utilecon de la internacia lingvo.

#### 4. Kion vi rekomendas al esperantistoj?

Laŭ mia opinio estas tre grave informi publikon pri Esperanto – pri aranĝoj, eventoj ktp, ke la homoj ĝenerale estu informitaj, ke Esperanto ekzistas, ke estas homoj, kiuj praktikas ĝin kaj ke ĝi havas sian lokon en ordinara vivo. Laŭ tiu ĉi mia konvinko mi ofte skribas artikolojn en nacia lingvo pri agado de nia rondeto en lokaj gazetoj Orlický týdeník, Českotřebovský zpravodaj kaj eĉ en informa retpaĝaro de la urbo Česká Třebová. En Esperanto mi publikigas Esperantajn artikolojn en bulteno Dio benu.

#### **Jiří Pištora (1931)**

*S-ro Jiří Pištora naskiĝis en Dobruška la 7-an de marto 1931. Li laboris kiel konstruanto en porfervoja ripareja entrepreno. En la jaro 1960 li iniciatis fondon de la Esperanta rondeto en Česká Třebová, en kiu li aktive laboras ĝis nun. Li estas honora membro de IFEF kaj ĈEA.*



#### 1. Kiel vi vidas la pasintajn 50 jarojn de Esperanta rondeto „Amikeco“?

Kiam mi kun kolegoj fondis Esperantan rondeton „Amikeco“ ĉe Uzina klubo de fervojistoj en Česká Třebová en la jaro 1960 mi tiam ne imagis, ke mi travivos en ĝia atmosfero 50 jarojn da interesaj eventoj, kiuj donis al mi multe da sperto kaj ankaŭ plezuron. Estas vero, ke ne ĉiuj momentoj estis gajaj, ni travivis en la rondeto ankaŭ malagrablajn momentojn. Sed grava estas tio, ke ĝi, spite ĉion nebonan, ĝis nun vivas kaj funkcias. Kio min nun maltrankviligas estas manko de junaj membroj en la rondeto. Rigardante reen mi devas konstati, ke niaj metodoj kaj klopodoj, kiuj havis sukceson pasintece nun ne funkcias. Estas necese serĉi novajn vojojn, novajn eblecojn.

#### 2. Kio plej multe ĝojigis vin en via poresperanta agado?

Por mi estas neforgeseblaj momentoj, kiujn mi travivis komune kun aliaj geesperantistoj dum renkontiĝoj de najbaraj rondetoj – el Svitavy, Polička, Žamberk, Pardubice, Litomyšl kaj aliaj. La etoso de tiuj renkontiĝoj estis por mi forta subteno en mia agado. Alian, tre impresan kaj ĝojigan travivaĵon mi havis dum mia vizito de Francio, kie mi prelegis pere de Esperanto en diversaj lokoj pri la internacia lingvo mem kaj pri nia respubliko. Mi estas konvinkita, ke ankaŭ por multaj geaŭskultantoj miaj prelegoj estis interesaj kaj novaĵplenaj.

#### 3. Kiel vi taksas la pozicion de Esperanto nuntempe?

Mi estas eble nun pesimisto. La nuntempa situacio tute ne favoras al Esperanto. La eksteraj premoj sociaj, materialaj kaj kulturaj ne donas multe da spaco por

disvolviĝo de humanaj aktivadoj, precipe Esperanto. Dum mia aktiva agado en Esperanta movado estis tute aliaj kondiĉoj – precipe limigoj, kiuj malpermesis libere vojaĝi kaj sinprezenti. Sed spite tion kaj eble paradokse dank’ al tio, ni vidis en nia poresperanta laboro eblecon liberiĝi de tiuj kondiĉoj kaj iomete ĝui „freŝan aeron“ en nia „vitrodoma politika medio“. Tiu ĉi sinteno donis al ni entuziasmon, kiu superis multajn malfacilaĵojn. Kaj nuntempe? Mi jam respondis supre – estas necese serĉi novajn metodojn, novajn vojojn.

### 8. Kion vi persone dezirus al Esperanto ĝenerale kaj al la rondeto „Amikeco“?

Kompreneble ĉion la plej bonan. Sed nun serioze: kiel eble plej multe da membroj, precipe junaj, kiuj alportos en la movadon novajn ideojn, novajn pensojn kaj novan entuziasmon. Kaj kion fari por tio? Informadi, propagandi kaj aktivadi – en tio mi deziras al ĉiuj multe da sukceso.

*Dankon al la honoraj membroj pro iliaj respondoj.*

### Nia filmo el UK Havana



### Komentoj pri la fotoj

- \* akcepto de la ĉeĥaj partoprenantoj de la UK fare de la ĉeĥa ambasadoro en Kubo
- \* antaŭ la solena inaŭguro de la UK
- \* Marek Blahuš kaj Johannes Mueller kiel anstataŭantoj de sialandaj komitatanoj de UEA
- \* ĉeestantoj de kunveno de la Subkomitato 8: Junularo, kiun Marek gvidis

## Plena Ilustrita Vortaro en la reto! Ĝi kostos 10.000 eŭroj

Printempe 2010 la junulara organizo E@I subskribis kontrakton kun SAT, la eldonanto de PIV, ke ĝi kreos retejon por la vortaro kaj SAT disponigos la elektroman version de la fama vortarego. Sed tiu versio estis kreita per malnova programo, ne taŭga por la retejo, la enretigo postulos grandan laboron de pluraj profesiuloj dum monatoj. Ĉio ĉi kostos minimume 10 mil eŭrojn. Nenio iros al SAT, ĉio estas bezonata por la programoj.

E@I nun lanĉas kampanjon por kolekti tiun monon de donacemuloj, unuopuloj same kiel de organizoj. Se vi deziras subteni la projekton, vizitu la paĝon <http://vortaro.net/>.

Reta aperigo de granda eksplika vortaro estos ankaŭ grava propaganda afero, ĉar Esperanto tiamaniere okupos sian lokon inter grandaj mondlingvoj. La programoj ebligas diversajn aranĝojn de la kapvortoj kaj derivaĵoj, ankaŭ surpaperigon en la klasika formo, do la enretigo plenumos plurajn signifoplenajn funkciojn kaj ŝovos nian aferon grandan paŝon antaŭen.

Nezapomněli jste se přihlásit na konferenci do Poděbrad?? Nabízíme Vám: v neděli odpoledne návštěvu skanzenu v Přerově nad Labem, v pondělí dopoledne prohlídku automobilky TPCA v Kolíně (zajímavé nejen pro muže), možnost zdokonalení se v práci s počítačem (PO + ÚT).  
Důležitá zpráva – poplatek 100.- Kč za pozdní platbu je zrušen!!!

## Kanti himnon parkere

Japana esperantisto HORI Jasuo fondis societeton por parkere kanti la himnon "La Espero". Ĝis nun 18 personoj sukcesis ricevi atestilon. Dum la UK en Kubo 5 homoj ekzameniĝis kaj ĉiuj sukcesis. Ĉu vi pensas, ke la nombro 18 estas granda? Multaj esperantistoj ne povas parkere kanti la himnon "La Espero". Tio estas tre hontinda afero kiel esperantisto. Ni kantu la himnon kun nia vizaĝo rekte direktita al la verda standardo. Kiam ni povas kanti la himnon parkere, ni povas havi pli da memfido pri nia Esperanto-kapablo, pli da amo al Esperanto. Ni povos senti, ke ni eniras en pli altan nivelon. Kongresoj estos pli viglaj kun laŭtaj voĉoj. Parkeraj kantadoj certe progresigos la movadon.

*Sinjoro HORI Jasuo, hori-zonto@water.sannet.ne.jp, 10-27 Simosinden Maebasi Gunma 371-0822 Japanio*

## 9-a Internacia Himalaja Renkontiĝo

Nepala Esperanto-Asocio organizas 11-tagan Internacian Himalajan Renkontiĝon marte 2011 por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj. Loĝado en bonkvalita hotelo en Katmando kaj en komfortaj gastejoj dum la piedvojaĝo. La unuajn kaj lastajn tagojn la partoprenantoj pasigos en Katmando valo, kie situas la ĉefurbo de Nepalo. Ĝian riĉan kulturan pasintecon atestas la tieaj historiaj distriktoj kaj monumentoj. La ĉefa parto de la Renkontiĝo estos piedmarŝo al la regiono je preskaŭ 20 kilometroj nordoriente kaj oriente de Katmando valo.

# Lančov 2010



Junaj esperantistoj



# Gratulantoj kaj torto por la tendarestrino



Itala esperantisto



## Rostado de kolbasetoj

Esperantista klubo en Brno ĉiujare antaŭ la ferioj renkontiĝas en la ĝardeno de geedzoj Veselý en Kohoutovice por rosti kolbasetojn super fajro.



Ne mankis ankaŭ kultura programo.



Manĝetoj estis preparataj en la kabano



## Renkontiĝo de eksaj tendaranoj



Jam la 13-an fojon renkontiĝis en Lančov fine de la tria etapo la eksaj tendaranoj, kiuj tien venadis kiel junuloj.



Matena vekado kun la klasika kanto „Vekiĝu, ho dormantoj!“, sekvata de matena gimnastiko kaj manĝo.



## Ovofritaĵo kaj Ĉantoryje



La Esperanto-klubo en Ostrava-Vítkovice ĉiujare fritas ovojn en ĝardeno de iu klubano, ĉi-jare ĝi okazis ĉe Jaroslav Suchánek.



La 20-an de junio 2010 marŝemuloj de la klubo iris sur la monton Ĉantoryje ĉe la landlimo kun Pollando.



Inter la partoprenantoj ne mankis ankaŭ esperantistoj el Slovakio kaj Pollando.



Post longa marŝado ripozo en internacia komunumo ...



... aŭ en arbara trankvilejo.



## Grand Biblio pri Esperanto

En Starto 2/2010 ni informis, ke la revuo Grand Biblio, kiu okupiĝas pri ĉeĥaj bibliotekoj kaj librokulturo ĝenerale, skribis pri Kurisu Kei. En la nova numero dediĉita al la projekto de Nacia Biblioteko laŭ Jan Kaplický estas priskribitaj ĉiuj fondoŝtonoj donacitaj. La 40-a devenas de esperantistoj (fakte sukceso de Viktor Dvořák el Moravské Budějovice). La numeroj de la gazeto en formato PDF estas elŝuteblaj el la retejo <http://www.grandprinc.cz/praha/tituly/grand-biblio>.



La bildo estas akompanata de teksto okupanta preskaŭ la tutan paĝon 11.

En la antaŭa numero sur p. 33 aperis mencio, ke en 2009 estis nialande eldonitaj 4 libroj en Esperanto inter 25 fremdaj lingvoj. Sume en 2009 aperis en Ĉeĥio 17 598 titoloj, el kiuj 4475 estis beletraĵoj, 1367 por infanoj, 5777 tradukitaj el fremdaj lingvoj. En 5927 bibliotekoj kun 927 filioj pruntas librojn 1,5 miliono da legantoj. -mm-

## Esperanto-tombo en Orlová

En Orlová apud Ostrava vivis kaj mortis esperantisto Josef Stankuš (19.3.1906-3.12.1967), kiu preparis por si tombon kun esperantlingva surskribo **Nia afero kresku kaj floru per ni en tuta la mondo. L. L. Zamenhof.**



Lia tombo estis ĝis nun nekonata. Hazarde ĝin trovis s-ro Jindřich Legut, nova (85-jara) ano de klubo Ostrava-Vítkovice.



Ankaŭ sur fasado de sia domo s-ro Stankuš havis verdan stelon. Kiu konis lin, skribu al: [rondeto@centrum.cz](mailto:rondeto@centrum.cz).

-mm-

## Lingva kaj turisma seminario en Studený

Niaj E-geamikoj el E-klubo „Saksa Svisio“ en Pirna (Germanio-Saksio) aranĝis ekde la 24a ĝis la 27a de junio 2010 tradician „Lingvan kaj turisman seminarion“ sur la teritorio de Ĉeĥio, en pensiono Kamzík (Ĉamo) en la vilaĝo Studený apud la urbo Česká Kamenice. Partoprenis 29 gesam-ideanoj, inter ili tri poloj, kvin ĉeĥoj kaj la ceteraj estis germanoj.



*Kelkaj el la partoprenantoj de la seminario*

La programo estis jam tradicie bunta. Ĉiutage okazis io tre interesa.

Prof. Sabine Fiedler el Lepsika universitato prezentis siajn tre fakajn studojn pri Esperantaj gramatikaĵoj kaj vortfarado. Por ekzerci sekvis interesaj taskoj por ĉeestantoj kaj fine kelkaj el ni prezentis mallongan teatraĵon „*La grandioza kongreso*“ (farseto de Rikardo Cash), kies protagonistoj estas unuafoja kaj veterana E-kongresanoj.

Pri specialaj mielaj spickuketoj parolis s-ino Tereza Nemere el la urbo

de Nikolao Kopernik - Toruń. La tradiciaj spickuketoj ne devas manki en mansaketoj de ĉiuj turistoj revenantaj hejmen el ĉi tiu nordpola urbo.

S-ro Josef Kříž prezentis temon „De Petr Ginz ĝis raketoplano Columbia“, kiun akompanis multaj interesaj dokumentoj - bildoj de familianoj Ginz, malnovaj bildkartoj de la urbo Terezín, originalaj paperaj pagiloj (kvitancoj) de geto Terezín el la jaro 1943, bildoj de la unua izraela kosmonaŭto Ilan Ramon kaj kosmopramo Columbia. Interesaj estis ankaŭ ĉeĥaj filatelaĵoj, kiuj rilatas al la menciita temo.



Plejparto de posttagmezaj horoj estis dediĉita por privataj ekskursoj en la pitoreskan ĉirkaŭaĵon. La ĉefa komuna ekskurso estis tuttaga kaj iris al la tombo de Julius Patzelt (1857-1927) en Horní Podluží.



J. Patzelt estis ĉeĥo-slovaka germana esperantisto kaj samtempulo de L. L. Zamenhof, kun kiu li korespondis, „delegito de UEA en Obergrund apud Warnsdorf“. Sur la tompo estas legebla surskribo „Per laboro al honoro“ (pliajn detalaĵojn bv. rigardi en Vikipedio). Sekvis ekskurso al „kruvojo“ en Jiřetín pod Jedlovou kaj al burgrino Tolštejn, kie ni komune tagmanĝis. Poste ni vojaĝis al renovigita objekto de Hrádek (Kastel-eto) apud Varnsdorf el kies rigardejo ni observis interesan zigzagan ŝtatan limon inter Ĉeĥio kaj Germanio. De tie ni revenis al Kamzík.

Al amuzplenaj vesperoj kun komuna kantado kontribuis ĉiuj ĉeestantoj, al kiuj nome apartenis Stanislaw Rynduch, polo vivanta longtempe en Germanio. Stano ne nur gitarludis kaj sole kantis, sed perfekte ludis eĉ blovharmikon kaj amuzis ĉiujn per sia rakontado.

La ĉeestantoj konkludis sian fruktonan kvartagan aranĝon per sabata dancvespero dum kiu akompanis ilin sperta muzikista duopo.

La organizantoj meritas grandan laŭdon pro multflanka kontento de ĉiuj partoprenantoj. Do, sinceran dankon, niaj saksaj geamikoj, kaj venontfoje denove ĝis revido en pensio Kamzík!

-ijk-

## AnkRo en Písek

sabate la 11-an de decembro 2010



Esperanto-klubo „La Ponto“ invitas vin al sia tradicia Antaŭkristnaska renkontiĝo!

Atendas vin kultura matineo en la klubejo de la urba biblioteko, vizito de adventa programo en la urbocentro kaj posttagmeza kristnaska programo. Ne mankos denove Alportado de Lumo, Kristnaska E-muziko kaj poezio, frandado, tombolo, tranĉado de pomo, meditado ĉe boatetoj el nuksoŝeloj kaj ŝatataj mesaĝoj de anĝeloj. Kiel aktualaĵo estos prezentita simpatia libreto „Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj“ verkita de d-ro Max Kašparů, kiun en traduko de Marek Blahuš antaŭnelonge eldonis KAVA-PECH.

Detalaj informoj kaj aliĝoj ĉe: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz), aŭ skribe ĉe P.Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, aŭ telefone ĉe 774 942424.

## Výzva zástupcům E-klubů, kroužků a sekcí ČES

1. Na webu Čes [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) v rubrice „**Kontakty**“ - „**Místní kluby**“ (<http://www.esperanto.cz/cs/esperantske-kluby>) naleznete opět mapku ČR s městy, v nich působí (alespoň formálně) E-kluby a kroužky. **Prosím zkontrolujte správnost údajů v případě vašeho klubu a případné opravy a doplnění prosím nahlašte na:**

[komputado@esperanto.cz!](mailto:komputado@esperanto.cz)

Telefonický kontakt je nepovinný. Můžete příp. zaslat i jednu ilustrační fotografii členů klubu (ze schůze či akce) (příklad – viz např. Pardubice), příp. doplňující informace o vašich aktivitách (příklad – viz např. Písek) místě a čase konání vašich schůzek apod, odkaz na webové stránky vašeho klubu, na webovou fotogalerii z vašich aktivit, ukázky z vaší činnosti (např. články, překlady atd.) apod.

Pro E-verzi uvítáme také stručné informace (+ vybrané fotografie) o vašem městě a okolí v esperantu (určené pro zahraniční esperantisty), s příp. nabídkou služeb (ubytování u esperantistů-ubytovatelů Pasporta servo apod., pomoc při zprostředkování ubytování, průvodcovské služby v esperantu apod.).

2. Nabízíme všem klubům, kroužkům a sekcím bezplatnou možnost zřízení:

a) virtuální mailové adresy (podle vzoru [nazevmesta@esperanto.cz](mailto:nazevmesta@esperanto.cz) – tj. např.

[liberec@esperanto.cz](mailto:liberec@esperanto.cz) nebo

[jmenosekce@esperanto.cz](mailto:jmenosekce@esperanto.cz) – např.

[IKUE-sekcio@esperanto.cz](mailto:IKUE-sekcio@esperanto.cz) nebo

[katolicka.sekce@esperanto.cz](mailto:katolicka.sekce@esperanto.cz)

Po nahlášení, že o ni máte zájem, provedeme automatické přesměrování na vámi udanou reálnou mailovou schrán-

ku: např. z [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz) nám chodí korespondence do [esperanto.pisek@seznam.cz](mailto:esperanto.pisek@seznam.cz)). Tj. nemusíte nic rušit a zavá-  
dět! Jednotná adresa každopádně lépe vypadá navenek, jednak např. usnadňuje vzájemnou komunikaci mezi kluby (nemusíme si pamatovat přesné znění adresy, stačí uvést jméno města).

b) zřízení jednoduchých webových stránek vašeho klubu v rámci domény [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) podle vzoru

[www.nazevmesta.esperanto.cz](http://www.nazevmesta.esperanto.cz)

– tj. např. [www.prerov.esperanto.cz](http://www.prerov.esperanto.cz)

Pro tyto stránky můžete získat od správce přístupové heslo a sami si je spravovat. Systém bude redakčně velmi jednoduchý a nebude pro něj potřeba nějakých složitých speciálních znalostí!

Zájemci prosím pište na adresu administrátora [tomecekales@seznam.cz](mailto:tomecekales@seznam.cz) a v kopii na [komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz).

3. **Kluby a kroužky, které dosud nemají e-mailové spojení, prosíme o jeho zřízení a nahlášení!** Schránku si můžete snadno zdarma zřídit a kontrolovat např. v místní knihovně, kde vám určitě rádi poradí. Elektronická komunikace jistě urychlí, usnadní a zlevní naši vzájemnou součinnost! Při této příležitosti prosím příp. motivujte k založení vlastní mailové adresy příp. i ostatní členy vašeho E-klubu, kroužku či sekce a k jejich nahlášení Libuši Hýblové [libusehyblova@seznam.cz](mailto:libusehyblova@seznam.cz) pro interní potřeby naší členské databáze. (Nespoléhejte se prosím, že již vaši adresu známe a máme ji zaevidovanou!).

Děkujeme předem za pochopení a spolupráci!

Pavla Dvořáková,  
[komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz)

## Web ČES

Od dubna se rozběhla nová verze svazového webu [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) (doposud pouze verze česká; esperantská se postupně naplňuje a připravuje ke spuštění).

Budeme rádi, když stránky budete často navštěvovat, používat a také na ně v rámci vašich možností přispívat a když o nich budete informovat i ostatní členy vašeho klubu a další své přátele a příznivce esperanta!

Na první pohled stránky zdánlivě vypadají hodně podobně a jako by se v nich mnoho nezměnilo. Při důkladnějším zkoumání ale zjistíte, že k jistým změnám a novinkám došlo.

A co je nejpodstatnější, jsou tentokrát naprogramovány tak, aby bylo snadnější do nich redakčně přispívat. Na designu se ještě pracuje a současná podoba není patrně konečná, pracujeme na jejím ev. zatraktivnění a dynamizaci. Doufáme, že web předvedeme na svazové konferenci v Poděbradech.

1. Např. hned v první rubrice „**O esperantu**“ nyní Miroslav Malovec buduje rubriku „Historie“ (Paměť E-hnutí) (viz lišta vlevo), pro niž uvítá spolupracovníky: pište na [malovec@volny.cz](mailto:malovec@volny.cz).

Novinkou oproti předchozí verzi jsou podrubriky „**Články v internetovém tisku**“ a „**Pořady v rozhlasu a televizi**“, které připravuje Pavla Dvořáková. Doporučujeme vaši pozornost, abyste zmíněné materiály pokud možno používali a dále šířili (mezi esperantisty i neesperantisty – jedná se o informace v češtině). Rovněž prosím o vaši spolupráci pokud jde o:

a) tvorbu nových článků o esperantu pro místní a regionální tisk

b) sledování vycházení těchto materiálů o esperantu

Prosím, abyste nás na adrese

[komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz)

o článcích a pořadech, které nejsou v přehledu zařazeny, informovali!

(Podrobná bibliografie bude uvedena v esperantské verzi webu nebo v budované svazové databázi, verze česká by měla být výběrová, protože je určena nejen pro naše interní potřeby, ale zejména pro veřejnost).

Tzv. **výstřížkovou službou** (shromažďující články vycházející v běžném tuzemském tisku) je stále pověřena paní Jarka Čejková z Frýdku-Místku

[jarkacejkova@centrum.cz](mailto:jarkacejkova@centrum.cz),

kterou informujte prosím o nových (ev. i starých) materiálech (příp. texty zašlete mailem v oskenované podobě). Na projektu digitalizace a uložení těchto článků na webu ČES se pracuje.

2. V rubrice „**Kontakty**“ prosím zkontrolujte v rámci svých možností aktuálnost a správnost uvedených informací – více očí více vidí.

Případné opravy a doplnění prosím nahlašte na [komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz)

3. V rubrice „**Odkazy**“ naleznete mj. **seznam měst, obcí a uměl. památek v ČR, které mají své webové stránky v esperantu**. Dáváme na zvážení v zájmu oživení vaší činnosti, zda byste se nechtěli pokusit o něco podobného ve vašem městě či okolí či jiné vámi oblíbené lokalitě (nemusí se nutně jednat o oficiální web města, ale např. o vybranou kulturní památku – příp. ne nutně web, ale i průvodcovský text).

Nejenže se při tom zajímavým způsobem zdokonalíte v jazyce, ale přispějete i k efektivnímu zviditelnění esperanta na veřejnosti jakožto živého a užitečného jazyka. Věřte, že ne všude byla k prosazení zveřejnění E-verze potřeba protekce, ve vícero případech tomu tak určitě nebylo. Rádi se s vámi podělíme o vaše zkušenosti!

Nově vytvořená pracovní svépomocná skupina pro překlady textů z oblasti cestovního ruchu vám může být v této vaší činnosti nápomocná. Kontakt: [etradukado@esperanto.cz](mailto:etradukado@esperanto.cz).

Doufáme, že vám budou k užítku i ostatní uvedené webové odkazy.

Budeme rádi za zpětnou vazbu od vás pokud jde o jejich využívání. (Jsme připraveni vytvořit i podrobnější a více strukturovaný přehled, ale záleží také na vaší odezvě, zda je ho vůbec zapotřebí!!)

Školení o využívání webových E-stránek proběhne v září v rámci setkání v České Třebové (17.-19.9.) a dle zájmu i po konferenci ČES (27.-28.9.).

4. V rubrice „**Akce**“ přinášíme **informace o E-akcích** v ČR a vybraných akcích v zahraničí.

Apelujeme na organizátory, aby nás zavčas zasílali potřebné podklady a pozvánky!

Na liště vlevo sa nachází rubrika „**Proběhlé akce**“, do které nám můžete (jak organizátoři, tak i účastníci) zaslat rovněž zprávu o konaných setkáních, spolu s několika vybranými fotografiemi. Rádi vámi zasláné materiály zveřejníme!

I vaše stručné (zejména pozitivní!) reakce na proběhlé akce můžete sami uveřejnit v **komentářích** (v kolonce pod informacemi o dané akci)!

5. Rubrika „**Jazykové kurzy**“ je ve

stádiu budování (mj. i s ohledem na nově nabízený písemný kurz Stana Marčeka – info viz Starto 2010/2).

6. Pestrost rubriky „**Aktuality**“ závisí i na vás! (nemusí jít jen o info z dění v ČR, ale v české verzi by to měla být každopádně událost zajímavá i pro neesperantisty!). Nezapomeňte, že přehled všech aktualit (chronologicky) naleznete v podrubrice „**Archív**“ (na liště vlevo).

Vaše časté návštěvy (zejména rubrik „**Akce**“ a „**Aktuality**“) budou zvyšovat statistiku webu, což je jistě důležité i pro hodnocení návštěvníky z řad veřejnosti! Rovněž se tím zlepšuje naše postavení ve vyhledávači (např. při zadání hesla „jazykové kurzy“)! I tímto jednoduchým způsobem, který vás stojí minimum času, můžete přispět ke zviditelnění esperanta na Internetu!

Těšíme se na vaše reakce, příspěvky a podněty (co na stránkách postrádáte, co byste uvítali). Připomínky technického rázu adresujte na administrátora a tvůrce stránek Aleše Tomečka

([tomecekales@seznam.cz](mailto:tomecekales@seznam.cz)), připomínky obsahové na níže uvedenou adresu!

**Nezapomínejte prosím, že svaz jsme my všichni a že i webová prezentace ČES by neměla být dílem jednotlivce, ale minimálně skupiny. Zájemce o pravidelné přispívání a spoluredigování rádi zaškolíme a zasvětime.**

Pavla Dvořáková,  
[komputado@esperanto.cz](mailto:komputado@esperanto.cz)





En la lernojaro 2009-2010 frekventis la rondeton gelernantoj de la 4-a ĝis la 8-a klasoj. La vortprovizon ili kompletigis per amuzaj ludoj „Pri la lernejo“, „Ni vojaĝas tra la mondo“, „En la vendejo“, „Miaj amikoj enlande kaj eksterlande“ k.s., ankaŭ per kantado de esperantigitaj folkloraj kantoj kaj per korespondado kun amikoj el Eŭropo kaj eĉ el Azio kaj Afriko. La geknaboj ekscias pri la vivo en aliaj landoj kaj kontinentoj kaj klopodas prezenti sian patrujon. Ĉi-jare ni instruis laŭ novaj lernolibroj de Růžena Vlková, en kiuj ĉiu vorto kaj teksto estas prezentita ĉeĥe, Esperante, germane kaj angle. La lernantoj povas kompari la lingvojn.

Ankaŭ ĉi-jare niaj gelernantoj estis sukcesaj en internacia konkurso pri infana desegno. En la kategorio A ĝis la 7-a aĝojaro akiris la 1-an premion Simona Petzová por la desegno „Princino Libuša aŭguras la gloron de Prago“. La transdonon de la premio ĉestis direktoro de la Radio Region el Jihlava. Laŭdindaj estas ankaŭ Miroslava Nožičková kaj Michaela Hrušková el la 6-a klaso, pro laboro interreta Štěpán Jordánek el la 8-a klaso kaj la estraro de la lernejo pro la subtenado de Esperanto.

*D-ino Kamila Bártlová*

Spiritisma Eldona Societo F. V. Lorenz en Brazilo ĉiujare eldonas almanakon kun interesaj artikoloj ne nur pri spiritismo. La ĉi-jara numero estas jam 30-a, por ni interesa ankaŭ pro kontribuo de ĉeĥaj esperantistoj. Sur la paĝoj 95-109 aperis **Intervjuo kun Jarmila Rýznarová, el Pardubice, Ĉeĥa Respubliko**, pri ŝia vivo, klubo en Pardubice, AEH kaj parencaj temoj, kaj la paĝoj 151-157 proponas artikolon de Petro Chrdle **Simbiozo de historio, estanteco kaj edukado**, fakte pri nia Esperanto-muzeo en Svitavy. Ankaŭ aliaj artikoloj estas interesaj (Chopin, historio de balalajko, Janusz Korczak, jardeko de lingvoj, jarlibroj de UEA, karitatoj, teatro, devo kaj libero, religiaj temoj). La malnovaj numeroj de la almanako kaj Komunikoj elŝuteblas ĉe [www.editorialorenz.com/almanako.html](http://www.editorialorenz.com/almanako.html).

Tie vi konstatos, ke ankaŭ en 2009 kaj 2008 Jarmila Rýznarová kontribuis pri Pardubice kaj Stanislav Schulhof.



Ankaŭ en la regiona gazeto Sedmička aperis la 25-an de majo 2010 intervjuo kun Jarmila Rýznarová pri cent jaroj de Esperanto en Pardubice.

## MEJLOŜTONA VERKO DE NOAM CHOMSKY NUN EN ESPERANTO

Unu el la plej famaj verkoj en la moderna lingvistiko, *Lingvo kaj menso* de Noam Chomsky, estas nun havebla en Esperanto. Ĝia unua anglalingva eldono aperis en 1968, sed en Esperanto aperis ĝia plej nova, tria eldono el 2006. *Lingvo kaj menso* estas tradukita de Edmund Grimley Evans kaj eldonita de UEA. Ĝi estas la dua volumo en la nova serio de mejloŝtonaj sciencaj verkoj "Scienca Penso", kies celojn estrarano José Antonio Vergara skizas komence de la libro.

„Ni estas tre kontentaj povi eldoni en inde altkvalita esperantigo reprezentan verkon de la plej elstara lingvosciencisto de nia epoko“, diras prezidanto Probal Dasgupta, kiu antaŭparole traktas ligojn inter la internacia lingvo kaj universala gramatiko. Li tuŝas ankaŭ sian personan lingvistikan partnerecon kun Chomsky. „Estis plezuro rilati al Chomsky kiel aŭskultema kaj malavara dialog-partnero dum jardekoj“, li skribas, finante: „Mi kaptas la okazon danki lin pro lia tuja esprimo de konsento, kiam mi petis lian permeson pri esperantigo de *Lingvo kaj menso*.“ Estas rimarkinde, ke laŭ la iniciato de Chomsky mem la originala eldonejo Cambridge University Press asignis la rajton je Esperanto-eldono al UEA senpage.

En alia antaŭparolo, „Evoluo de la ĉefaj tezoj de Chomsky“, prof. Hiro-

shi Nagata enkondukas al la legado de la verko, kiu laŭ li „priskribas, laŭeble en neformala maniero, la Chomsky-an generan gramatikon kaj ties psikologiajn kaj filozofiajn implicojn, difinante ties sciencajn rolon en historia perspektivo“. Nagata tre laŭdas la elstaran esperantigon. „Plejparto de la Chomsky-aj terminoj estas originalaj, kio sendube prezentas defion al la tradukanto.“ Pri tiu defio Edmund Grimley Evans brile sukcesis.

La prezo de la 188-paĝa libro estas 9,90 eŭroj. Ĉe samtempa aĉeto de minimume 3 ekzempleroj la Libroservo de UEA donas rabaton de 1/3. Al la prezo aldoniĝas la sendokostoj (10%, minimume 4 eŭroj) kaj, por EU-landoj, imposto de 6%.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 386*

## Filatela interŝanĝo

54-jara inĝeniero serĉas esperantistojn-filatelistojn por reciproka interŝanĝo de poŝtmarkoj. Se iu interesiĝas pri poŝtmarkoj, emisiitaj de eksa Sovet-Unio aŭ nuntempaj Ukrainio, Rusio kaj kelkaj aliaj landoj, kiuj aperis post disfalo de eksa Sovet-Unio, tiu bv. skribi al adreso:

Vjaĉeslav Vasiljev  
Osipenko 10-2  
LUGANSK, UA-91005  
Ukrainio



## Skalka

La 12-an de julio 2010 s-ano Václav Nosek de Kojetín, membro de Esperanto-klubo en Přerov, organizis interesan renkontiĝon de kvar muzikistoj: s-ano Duda (violono, EK Olomouc), s-ano Nosek (akordeono, EK Přerov), s-ro Kaděra (trumpeto, eksinstruisto) kaj s-ro Kuchař (akordeono, muzikinstruisto).



Kvarteto de tiuj ĉi muzikistoj renkontiĝis en banloko Skalka, malgranda, sed ĉarma vilaĝeto en la distanco de du kilometroj de Čelčice, vilaĝo, kie ripozas s-ano inĝ. Jozefo Novák, iama aktiva esperantisto de EK Olomouc, kiu mortis la 31-an de julio 2009 sekve de aŭtomobila akcidento. La triopo Duda, Nosek kaj Láni (EK Olomouc) vizitis lian tombon en la tombejo de la vilaĝo Čelčice, por honorigi unujaran datrevenon de lia morto. Ni admiris la lokon kun bone prizorgitaj tomboj, kiu estas fermita kaj ĉiu familio de la vilaĝo havas ŝlosilon.

Post dokumentado ni foriris dum

varmega tago en la banlokon, kie okazis malgranda koncerto por ĉe-estantaj klientoj de la banloko kaj interesatoj. Ĉarmaj diversspecaj melodioj entuziasmigis la publikon, inspiris muzikistojn kaj kreis bonan etoson por ili, kun deziro ripeti tiun ĉi okazintaĵon en la estonteco. Ĉar partoprenis ankaŭ prezidanto de EK Prostějov, Jarda Liška, kiu alvenis per bicikle, okazis fakte neformala renkontiĝo de reprezentantoj de EK Přerov, Prostějov kaj Olomouc, de la kluboj, kiuj multjare kunlaboras kaj propagandas diversspece nian lingvon, internacian ligilon same kiel muziko. Mi dankas al s-ano Nosek, kiu denove prezentiĝis kiel bona muzikisto, fotografisto kaj grafika eksperto, kiu tiamaniere faras nepritakseblan laboron por propagandi Esperanton kaj sian klubon. Koran dankon al li kaj al ĉiuj, kiuj partoprenis.



*Olomouc la 6-an de aŭgusto 2010  
Jan Duda  
Esperanto-sekcio de VSMO*

## Ĉu vana voĉo sur dezerto?

Esperanto alportadis dum mia vivo multe da ĝojo kaj espero, tamen ne mankis afliktoj laŭkazaj, do mi sentis min kvazaŭ Sizifo, obstine ripe-tanta laboron tute vanan, ekz. en *STARTO*: 1995,1,13; 2000,3,10; 2010,2,57. Oni ne respektas la botanikan nomon de la printempa, flave floranta pereno *Adonante vernalis*, ĉeĥe *hlaváček jarní*, esperante **adonanto**, ne „adonido“ ...



Tamen ne nur Starto ĉagrenas pro misoj el la sfero scienc-leksika. Fortimige sennombraj estas tiuj, kiujn faris NPIV, ne hezitanta perturbi nomenklaturajn internacie kodigitajn. Tiom malpli bona estas la fakto, ke temas pri intervenoj arbitraj.

*J. Kavka*

*La redaktoro de Starto respondis al d-ro Kavka, ke li trovis en siaj libroj kaj ankaŭ en la interreto, ke la floro havas du sinonimojn, nome Adonis vernalis L. kaj Adonante vernalis (L.) Spach, kaj ke plej ofte oni trovas Adonis sur la unua loko en la libroj*

*kaj retejoj. Ekzistas eĉ du studoj pri la floro de Jiří Bělohoubek, kiu en 1997 uzis Adonante kaj en 2006 Adonis (eldonis nord-bohemia filio de Ĉeĥa Botanika Societo). D-ro Kavka sendis jenan klarigon:*

Ĉiu botanikisto, vidante la nomon **Adonante vernalis (L.) Spach.**, tuj scias, ke Linné (en la krampoj) estas la pli frua aŭtoro, dum Spach. la pli moderna, do valida. Se interesus vin la striktaj reguloj de la botanika nomenklaturado, mi rekomendas al vi: J. Doštal: *Botanická nomenklatura* (269 p.) Nakl. ČSAV, 1957. Sur via kserokopio oni ne procedas laŭnorme: Unue troviĝu la nomo valida, poste sube la sinonimo eksa. Se tamen Bělohoubek aplikis tiun ĉi eksan en 2006, oni konjektu, ke temis simple pri malatento.

Vi povas min kredi, ĉar de botaniko mi estis okupata dum 75 jaroj, eĉ serioze, t.e. uzante mikroskopon kaj ĥemiaĵojn. Striktaj reguloj validas ankaŭ por mineralogio. Tial ŝokis min NPIV, aplikanta la nomaĉon „kupro-pirito“ por la internacie kodigita **ĥalkopirito**. Jen plua ekzemplo de la fama H-fobio ...

Nu, mineralogio tamen estas pli bonŝanca ol botaniko, kiu devas ofte ŝanĝi nomojn ekz. pro la DNA-esplorado ...

Kore via Sizifo

Josef Kavka

## Ŝtelitaj montoj

Monto Ararato estas tradicia emblemo de Armenio kaj tial ĝi troviĝas en armenia regna blazono malgraŭ tio, ke iama Armenio malgrandiĝis tiel, ke nuntempe Ararato jam ne troviĝas sur la teritorio de la Armena respubliko, ĝi troviĝas en Turkio. Iam reprezentanto de Turkio en UNo protestis kontraŭ tiu ĉi fakto kaj postulis, ke Armenio forigu Araraton el sia blazono, ĉar Ararato ne troviĝas sur armenia teritorio. Ĉar Armenio tiam estis unu el sovetuniaj respublikoj, respondis al li reprezentanto de Sovetunio, kiu diris, ke Armenio estas preta forigi Araraton el sia blazono, sed nur kun kondiĉo, ke Turkio forigos el sia blazono kaj flago lunarkon, ĉar la Luno ne troviĝas sur turkia teritorio.

Ion similan ni povas vidi sur la blazono de Slovakio, kie estas tri montoj, pri kiuj oni diras ke tio estas Tatro, Fatro kaj Matro, kvankam la Matro ne troviĝas en Slovakio, sed en Hungario.

„Arĝentan medalon“ de altitudo posedas monto, kies altitudo estas 8 611 metroj (oni ankaŭ indikas 8 760 metroj), kaj kiu abundas je multaj nomoj: Dapsang, Ĉogori, Mount Godwin Austen, Qogir Feng k. a. Tamen plej ofte oni indikas ĝin ne per nomo, sed per kodo K2. Pro eksterordinare danĝera grimpado oni ĝin nomas „monto mortiganto“. Iam ĝi estis la plej alta monto de Hindio, sed nuna fakta stato, kiun Hindio ne

agnoskas, estas tia, ke ĝi troviĝas sur la limo de Pakistano kaj Ĉinio.

La plej alta monto de Eŭropo estas tradicie Monto Blanka, kiu situas en Alpoj, do oni povas diri „en la koro de Eŭropo“. Sed britiaj kaj usonaj geografoj limigas Eŭropon alimaniere ol geografoj de kontinenta Eŭropo, ili „transŝovis“ eŭrop-azian limon de riveroj Kunio Laj Maniĉo al kresto de Kaŭkazo, do tiel ke la plej alta monto de Eŭropo estas Elbruso, kiu estas en Eŭropo nur duone, ĉar ĝia alia duono estas en Azio (por kiu ĝi ja estas tro malalta). Krom Elbruso estas pli altaj ol Monto Blanka ankoraŭ kelkaj aliaj kaŭkazaj montoj. Tiel britoj kaj usonanoj ŝtelis el la koro de Eŭropo tradician dominanton.

Ili ankaŭ ŝtelis al Oceanio ĝian plej altan monton *Puncak Jaya* (antaŭaj nomoj: *Carstensz-toppen*, *Gunung Sukarno*), situantan en okcidenta parto de Novgvineo. Kontinento Oceanio (ofte nomata „Aŭstralio kaj Oceanio“) havas naturajn limojn, sed britiaj kaj usonaj geografoj ilin ne respektas kaj indonezian parton de Novgvineo metas en Azion, kio estas „negeografia“, politika vidpunkto.

*Lubomír Středa*



# INTERNACIA SEMINARIO “APLIKO DE ESPERANTO EN LA PROFESIA AGADO”

11-14.06.2010 Karlovo –Sopot Bulgario

En Karlovo sukcese finis sian laboron la II-a Internacia Seminario AEPA 2010, kies organizantoj estis AIS-Bulgario, Bulgara E-Asocio, Internacia Universitato Karlovo kaj la Regiona Estraro de la neesperantista organizo ”Scienc-teknika Asocio” en Bulgario. Oni prelegis Esperante kaj bulgare.

Prelegoj: Flaŭro kaj floro en Eŭropo; Eŭgeniko; Eblecoj por enkonduko de Esperanto kiel informlingvo en la patent-teknika informado; Utiligo de Vikipedio; Latinidaj planlingvoj en sciencoj; Organizado de internaciaj kongresoj kaj simpozioj; Rememoroj por Ada Sikorska; Plastaĵoj en la akvaroj (riveroj, lagoj, maroj) - videblaj kaj nevideblaj konsekvencoj; 100 Argumentoj kontraŭ la Atomenergio; Apliko de Esperanto en metaglosoterapio de skizofrenio; Kulturo kaj moro de la bulgara popolo; Manaĝerado en la agrara ekonomiko; Ekonomiko kaj gvidado de turismaj firmaoj; Bazaj principoj de la makro-kaj mikroekonomiko; Certaj aspektoj de lingvaj problemoj kun ekzemploj en terminologia laboro; Esperanto kaj sociologio; Esperanto kaj la angla en interkultura komunikado; Turismo en Latvio; Apliko de la naturkuracado por kuracado de nervaj malsanoj; Influo de la slavaj lingvoj en Esperanto; Historio de Bulgara E-movado; La originala E-literaturo; Eŭrologio - mem kompreni la utilecon de Esperanto kiel kontaktlingvo; Filozofiaj problemoj de matematiko; Kultura heredaĵo en Albanio; Diasporoj Pola kaj Albana; La ortodoksa religio dum la tempo de la monda krizo kaj globalizado; La Spirito de Dio kaj relieviĝoj el mortintoj; Virtualaj sociaj retoj helpe al profesiuloj; Eldono de sekura Esperanta mono; Bazaj principoj de fitopatologio kaj plantprotekto; La ekologia scienco kaj ĝiaj rilatoj al la aliaj fakaj sciencoj; Depono de aŭtora rajto; Energiaj fontoj; Historio de urbo Sopot; La karlovano Gon Nočev - konstruktoro de “Apolo”; Esperanto kaj la kontaktoj inter la studentoj kiel estontaj fakuloj; Renesansa arkitekturo en Bulgario; Aplikado de Esperanto en Religioj kaj Filozofioj. *laŭ Bojdar Leonov*



## Skokovy

11.-17.10.2010

Ni invitas vin diskuti pri diversaj temoj (krom politiko kaj malsanoj), promeni en la ĉirkaŭaĵo, amike kunesti, kreadi. Invitas Eva Pánková, tel. 602 933 522, [eva.pankova@recese.com](mailto:eva.pankova@recese.com). Aliĝojn akceptas: Jindřiška Drahotová, Sadová 745, 293 01 Mladá Boleslav, tel. 720 652 320; [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz).

## KAEST 2010

18.-21.11.2010

### Modra-Harmónia apud Bratislava

nova formo de malnova aranĝo  
(nun organizata de [E@I](mailto:E@I)),  
prelegoj kaj  
diskutoj pri

"Modernaj teknologioj por Esperanto",  
viva scienco  
(praktikaj eksperimentoj),  
distra kaj ekskursiva programo

nun kun rabato de 5 EUR por membroj de  
SKEF, SKEJ, ĈEA kaj ĈEJ!  
Detalojn legu en Starto 2/2010 kaj  
<http://www.ikso.net/kaest/>

## La muzea nokto plenis de novaĵoj



La Esperanto-muzeo la duan fojon engaĝis sin en la aranĝon „Muzea nokto en Svitavy“. Alveturis esperantistoj ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Slovakio kaj Hispanio. La programo vere riĉis. Jam je la 16-a horo la vizitantoj povis ĉeesti inaŭguron de ekspozicio de konata bonhumora desegnisto Pavel Rak okaze de eldono de lia libro *Desegnita humuro* kun subtekstoj en kvar lingvoj.

Sekvis bapto de nova lernolibro „Esperanto přímou metodou“ (Esperanto per rekta metodo) en ĉeesto de la slovaka aŭtoro Stano Marček, la ilustristino Linda Marčeková kaj la eldonisto Petro Chrdle. Kiel baptopatrino agis prezidentino de ĈEA Jana Melichárková. La libro aperis jam antaŭe en dudek kvar aliaj lingvoj, ekz. japane, nederlande, kroate kaj greke. Preparitaj estas tri novaj lingvaj versioj. La librojn *Desegnita humuro* kaj *Esperanto přímou metodou* la vizitantoj povis tuj aĉeti kaj ricevi subskribon de la aŭtoroj. Stano Marček donacis al la muzeo preskaŭ ĉiujn jam eldonitajn lingvajn versiojn, kiuj baldaŭ estos tie eksponitaj.



Poste venis nova aranĝo „Pentrado de infanoj kun Pavel Rak“. Pavel Rak rakontis pri siaj bestoj, pri sia pentrado kaj desegnis figuretojn. La infanoj aŭskultis atente kaj tuj aktive pentris. Siajn kreaĵojn ili forportis hejmen kun dediĉo de Pavel Rak. Por ĉiu li kreis novan originalan bildeton kiel memoraĵon pri la muzea nokto. La infanoj rekompencis Paŭlon Rak per kantado, kiu lin kortuŝis. Jam nun membrinoj de loka esperantista societo interkonsentis kun Pavel Rak kunlaboron kaj venontjare dum la infantago ili ripetos la aranĝon, kiu certe digne konkurencos kun „Marci-pana Kristnasko“.

La resto de la vespero apartenis al la esperantista junularo. Ili projekciis filmon pri Internacia Junulara Kongreso en Liberec 2009, kiun helpis realigi ankaŭ la junaj esperantistoj el Pollando kaj Germanio. Parto de la kongresa programo efektiviĝis sur la placo de Liberec por la publiko, al la publiko estas dediĉitaj ankaŭ mallongaj filmetoj pri Esperanto, kiujn ili produktas. Ilia laboro povas inspiri ankaŭ plenkreskulojn.

*Libuše Dvořáková*

# KALENDARO

2010-09-17/19 Simpozio okaze de 50-jariĝo de Esperanto-Klubo en Česká Třebová

2010-09-24/26 Konferenco de ĈEA, Poděbrady, cea.polnický@quick.cz

2010-09-26/28 Seminario en Poděbrady

2010-11-18/21 KAEST, Modra-Harmónia, Slovakio, P. Baláž, petro@ikso.net

2010-12-04 Marcipana Kristnasko en E-muzeo Svitavy, dvor.libuse@seznam.cz

2010-12-11 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek

2010-12-29 E-Silvestro en Česká Třebová, jk.esperanto@seznam.cz

## Kalendaro 2011

2011-03 Centjariĝo de EK Olomouc, dudajanol@centrum.cz

2011-05-07/14 La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, ladislav.kovar@tiscali.cz

2011-08-2/9 Kongreso de KELI en Poděbrady

## Rememoro

el arkivo



Niaj Esperanto-veteranoj en Klubo de Pragaj Esperantistoj. De maldekstre: eksprezidanto de ĈEA Jaromír Jermář, geedzoj Berger, Věroslav kaj Zdenka (forpasinta 22.5.2008), kluba prezidanto Jiří Patera kaj mondfama poetino Eli Urbanová.

fotis Petro Chrdle

# Nia kroniko

Forpasis gesamideanoj **Ludmila Čermáková** el Ostrava-Zábřeh kaj **Fran-tišek Stejskal** el Osek u Duchcova.


La 19-an de majo 2010 mortis **Marie Turková** el Plzeň, iama klubestrino kaj membrino de kontrolo kaj revizia komisiono de ĈEA.

La 4-an de junio 2010 mortis **Vladimír Sládeček** el Ostrava-Poruba,



konata inter esperantistoj kiel amatora kantisto kaj gitarludisto sub nomo Vlado. Li enĉeĥigis plurajn spiritismajn librojn el Esperanto kaj estis estimata persono inter astrologoj, ĉeĥlingve li eĉ verkis kelkajn librojn pri astrologio (*Tranzitoj en astrologio, Baza libro pri hermetismo, Aspektoj de planedoj, Jara horoskopo* k.s.)

La 7-an de aŭgusto 2010 forpasis **Ladislav Špína** el Liberec, fervojisto. Jam kiel 14-jarulo li laboris en loka kongresa komitato, kiam en 1949 okazis tutŝtata kongreso en Liberec. Poste li estis kluba komitatano por propagando kaj fine eĉ kluba prezidanto. La 18-an de februaro 1972



Naiva Teatro en Liberec ludis komedion de V. V. Klicpera *Lavtrogo* en lia esperantigo. Ankoraŭ pasintjare li helpis al nia junularo prepari Internacian Junularan Kongreson en Liberec. Ĝis sia morto li plenumis funkcion de kasisto en LKK por Internacia Fervojista Kongreso en Liberec 2011.

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

### Upozornění

#### pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

## Zájemci o časopisy

### POZOR na změnu bankovního účtu!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz). Předplatné uhradte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato**: 1050,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 630,-Kč  
**La Gazeto**: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto**: 560,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 340,- Kč.

**Juna Amiko**: 260,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

**Literatura Foiro**: 970,- Kč (\*640,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Heroldo de Esperanto**: 1050,- Kč (\*700,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

**Femina**: 640,- Kč (\*430,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

**Litova Stelo**: 290,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého esperantského svazu - 41. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789  
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,  
tel. 774 928 974**

**Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2010**

-----  
**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 41-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
15.11.2010**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj:**

**1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**